

# GRAVAJ DATREVENOJ




Antaŭ 225 jaroj mortis en Vieno :

**ANTONIO VIVALDI. — La virtuoza itala komponisto estas unu el la plej famkonataj majstroj. Li ĉefe komponis verkaĵojn por violono kaj orkestro. Li estis kapelestro en la Sankta-Marko preĝejo kaj samtempe direktoro de la Konservatorio. J.S. Bach transformis multajn liajn koncertojn en koncertojn por orgeno kaj klaviceno.**



Antaŭ 20 jaroj mortis en Silezio :

**GERHART HAUPTMANN. — La plej eminenta germana dramisto en la jarcento estis unu el la unuaj « naturalistaj » literaturistoj. Lia nomo ligiĝas al tiu de la plej grandaj aŭtoroj de la lasta generacio. Liaj plej konataj verkoj estas : « La teksisto », « Rose Bernd » kaj « La kastor felo ». Li ricevis la Literatur-Nobel premio en 1912.**



Antaŭ 5 jaroj mortis en Ketchum :

**ERNEST HEMINGWAY. — La usona verkisto, « marlupo » kaj aventur-amanto jam en siaj junaj jaroj, ricevis la Literatur-Nobel-premion kaj la Pulitzer - premion. La dura stilo kiun li majstre uzis en sia rakonto « La maljunulo kaj la maro », karakterizas la krudan raelismon troveblan en ĉiuj liaj romanoj.**